

Thomas Moore, 'T is the Last Rose of Summer	Thomas Moore, La lasta rozo	Thomas Moore, La lasta rozo de somero	Thomas Moore, La lasta rozo
	<i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	<i>tradukita de N. N. 101</i>	<i>tradukita de Clarence Bicknell</i>
'T is the last rose of summer left blooming alone; All her lovely companions are faded and gone; No flower of her kindred, no rosebud is nigh, To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.	Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero, Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero. Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burĝono en proksimo, Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.	Nun floras de l'somero la sola lasta rozo. La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozoz: ne estas flor' parenca, aŭ roz-burĝono ia, Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.	Jen la lasta rozeto de fora somer'! Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'! Ne restas parenco, ne unu roz-flor' Partoprenas komplete en ĝia dolor'.
I'll not leave thee, thou lone one! To pine on the stem; Since the lovely are sleeping, go sleep thou with them. Thus kindly I scatter thy leaves o'er the bed, Where thy mates of the garden lie scentless and dead.	Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili; Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili! Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena: Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardena!	Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti. En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dormetas: Do floron vian teren ĝentile mi disĵetas.	Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'. Iru dormi kun ili en paca ripoz'. Nun viajn petalojn disĵetas mi for Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.
So soon may I follow when friendships decay, And from Love's shining circle the gems drop away. When true hearts lie wither'd and fond ones are flown, Oh! who would inhabit this bleak world alone?	Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela, Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela. Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sentemaj flugis for el rondo, Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?	Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus: Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaj ne plu estus, En la dezerta mondo volonte kiu restus?	Tiel same volonte formortus mi mem, Se ne plu min atendus amika manprem'. Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond' Volus loĝi izola sen amorespond'?
...	...	...	...

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25).

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Moore](http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore).

Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.

Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 – †1918-07-17).

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojoista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikisource.org/wiki/AEktoro:Bicknell\\_C.\\_,\\_Bordigheza](http://eo.wikisource.org/wiki/AEktoro:Bicknell_C._,_Bordigheza).